

ECOSOC Junulara Forumo 2019



Ferma Solenaĵo: Oratoraĵo fare de Rakoel Maertens

Daŭro: 10 minutojn

Via moŝto, Prezidanto de ECOSOC, Via moŝto, Ĝenerala Sekretario, Ekscelencoj, delegitoj, gesinjoroj.

Antaŭ kelkaj semajnoj, mi promenis laŭ la malnovaj stratoj de Kembriĝo. Estis sune; mi aŭdis birdojn. La unua odoro de printempo estis flarebla. Mi promenis al mia laboratorio por tago, kiu ŝajnis promesplena kaj produktema. Kiam mi alproksimiĝis al mia oficejo, mi aŭdis homojn krientajn. Mi ne povis distingi ĉu de ili venis entuziasmo, timo aŭ io alia. Nekapabla je subpremado de mia scivolemo, mi moviĝis al la stranga sed interesa bruoj. Dum mi pliproksimiĝis al la foirplaco, mi vidis kreskantan homamason. Malrapide moviĝante antaŭen, la afero iĝis klara al mi. Estis mezlernejoj. Mi demandis min: Kial ili estas ĉi tie? Tiam, mi ekkomprenis. Memkompreneble: la klimatmanifestacioj! Unuiĝintaj sur la foirplaco estis junaj kolegoj miaj, marŝantaj por la klimato. Mi estis feliĉa kaj ridetis, demandante al mi, ĉu mi aliĝu al la grupo? Mi elektis ne fari tiel, raciigis mian konduton kaj plu promenis al mia oficejo. Mi plu prilaboris mian projekton.

Ni fakte antaŭenigas promesplenan laboron ĉe la Kembriĝa Laboratorio pri Socia Decidado: ni kreas vakcinon kontraŭ falsaj novaĵoj. Pli specife, mi prilaboras psikan vakcinon por protekti homojn kontraŭ misinformado pri klimatsanĝiĝo per inokulado. Kiom ajn interesa kaj entuziasmiga la projekto estas, tamen mi ne povis subpremi la emon eliri el mia laboratorio kaj aliĝi al la manifestacio. Rapide glutinte mian espreson, mi salte stariĝis, prenis la scian dokumenton kiu estis antaŭ mi, kuris eksteren kaj aliĝis al la junularo ĉe la foirplaco. Mi svingis la priklamatan paperon en la aero, montrante scian pruvon de klimatsanĝiĝo kaj eblaj solvoj por kontraŭbatali ĝin. Surprizis min, ke kelkaj el miaj laborariaj kolegoj estis tie. Pri kelkaj el ili mi scias ke ili havas tre malsaman politikan opinion ol mi. Mi tuttage legis sciencajn artikolojn pri kiom dividita mia socio estas, pri kiel kelkaj partioj ekspluatas dubon kaj necertecon kiel ilon por apartigi la homaron. Niaj diferencoj ne gravas je tiu momento.

Tute ne temis pri malsamaj ideologioj. Temis pri junuloj unuiĝintaj por batali cele al niaj komuna intereso. Temis pri rakonto kiun mi titolus, "La Unuiĝinta Junularo".

Mi memoras mian unuan viziton al Sud-Koreio, kie mi partoprenis junularan Esperanto-renkontiĝon. Dum mi promenis en Seulo, mi ne sciis kiel kondukti. Mi ne komprenis la gestojn de la homoj ĉirkaŭ mi. Tio estis stranga, sed signifoplena sento: eĉ la plej etaj gestoj ne la samon signifis. Mi deziris brakumi homon, kiun mi ĵus renkontis, sed mi poste ekkonsciis, ke tio ĉi ne estas farebla dum la unua renkontiĝo kun iu, ke tio havas tie malsaman signifon ol tiu kutimo konata al mi. Post ioma kunvivado kun ili kaj strebado al kompreno - kaj per mia junecplena komprenemo, kaj per kunlaborado en junularaj projektoj - mi ekaprezis la diferencojn, kaj samtempe mi malkovris kiom ni similas. Multaj el la komencaj bariloj baziĝis sur komenca manko de kompreno.

Unu semajnon poste mi estis en Togolando por eduka Eŭropa Unio-Afrika kunlaborprojekto de mia NRO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). La diferenco inter la du landoj, Togolando kaj Sud-Koreio, ŝokis min. Mi estis ĵus adaptiĝinta al la korea kulturo. Tiam, tie, homoj agis malsame, havis malsamajn dezirojn kaj malsamajn difinojn pri feliĉo. Mi deziris scii tion, kion ili pensas, kaj kial, sed tio estis malfacila komence. Mi memoras belan momenton kiam mi vidis du infanojn gaje frapantaj siajn manojn. Aŭdinte ilian gajan ridon, mi gajiĝis tuj, kaj provis komuniki tion, sed mi ne sciis kiel. Mi provis aliĝi. Mi frapis miajn manojn kelkfoje, esperante ke tio kongruos. Kaj jes, tio funkciis! Subite, ni estis harmoniaj, frapantaj niajn manojn kune, ridantaj, kundividantaj feliĉon. Malgrandaj momentoj, sed signifoplenaj. Kelkajn tagojn poste, mi ekkomprenis kion ili fakte pensis. Kaj la diversaj junuloj en niaj projektoj donis al ni la unikan komprenon kaj inventoplenajn alirojn kiuj helpis al niaj projektoj flori. Ambaŭkaze, Sud-Koreie kaj Togolande, la afero komenciĝis per etaj, afablaj, homrilataj agoj tra homa komunikado kaj per egaleca reciproka aliro. Ĉi-kaze, danke al la uzado de komuna lingvo, Esperanto, ni ekkontaktis unu la alian. Sed estis niaj komunaj celoj kiuj unuigis nin en agado, kiu florigis nin kune kiel diversecan grupon. Tio ĉi estis rakonto pri komunikado kaj kompreniĝo.

Ni vivas en epoko de necerteco kaj dubo. Tamen, rigardu ĉirkaŭ vi. Rigardu la homon sidantan apud vi. Mi estis ĉi tie dum sufiĉe longa tempo jam.

Mi renkontis multajn el vi. Kaj ni ĉiuj ne estas samaj. Ni havas vastegan opinidiversecon. Sed tio ne distras nin. Samkiel la junularo sur la foirplaco en Kambriĝo, aŭ la homoj kiujn mi devus esti ne brakumintaj en Sud-Koreio, ni havas komunajn celojn. Estas per rilato kun homoj apud ni kaj per la emo kompreni unu la alian kaj persone paroli kun ili, ke vi povas kompreni viajn valorojn.

Ankaŭ tio estas kerna parto de egaleco kaj inkluzivemo, kaj pli kompleksa ol multaj pensas. Kelkaj flankoj estas ofte forgesataj, kiel lingva malegaleco. Estas grave rimarki: tiu ĉi estas la Jaro de la indiĝenaj lingvoj. Ni devas agnoski la valoron de lingvoj kaj ilian ligan al kulturo, por ke ni povu maksimume kompreni unu la alian.

Al ĉiu Ministroj pri Junularo, diplomatoj kaj sekretarioj: mi deziras memori vin, ke la mondo ŝanĝiĝas rapidege. Por la rapide evoluantaj problemoj, ni bezonas novajn solvojn. Multaj el la malnovaj ideoj ne bone funkcias. Ni devas esti inventemaj. Ni devas esti kapablaj je pensado per novaj konceptoj kiel cirkla ekonomio kaj spronado iudirekten. La Unuiĝinta Junularo povas doni unikan kaj inventeman komprenon, kiu indikas la vojon al novaj aliroj kaj pli diversa agadaro. Samkiel ni bezonas vin, vi bezonas nin. Lerne de la UN Junulara Strategio, kaj certigu ke via junularo estas lertigita kaj havas aliron al bonkvalita edukado. Tio ĉi estas ne nur bonefika por ni, aŭ por vi, sed decidus la atingon de niaj komunaj celoj. Se ni deziras solvi tutmondajn problemojn, ni bezonas esti ĉe la intertrakta tablo kiel egaluloj.

Al miaj kolegoj kaj amikoj engaĝitaj pri junularaj defioj, la ECOSOC Junulara Formumo provizas al ni unikan platformon por esprimi niajn opiniojn, ideojn kaj proponojn. Estas grave ne vidi tion ĉi kiel unufojan eventon. La afero ne ĉesos ĉi tie, hodiaŭ. Morgaŭ, la sama platformo daŭre vivos. Engaĝiĝu! Agu! Ni ŝovis tiun ĉi forumon pli proksimen al la Altnivela Politika Forumo pri Daŭripovo (HLPF) kaj al la Pinta Renkontiĝo pri Celoj por Daŭripova Evoluo (SDG-Summit) por plifaciligi la transdonadon de niaj ideoj al pli altaj politikaj niveloj. Kunportu hejmen tion, kion vi diskutis ĉi tie, kaj informu tiujn kiujn vi reprezentas. Se vi reprezentas junularan organizaĵon, unuigu viajn strebojn kune kun aliaj junularaj organizaĵoj. Platformoj kiel la Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizaĵoj (ICMYO) povas helpi vin diskonigi viajn ideojn kaj plifortigi viajn strategiojn kunordige kun aliaj junularaj organizaĵoj. Utiligu ilin. Konektiĝu kun tiaj platformoj.

Se via lando ankoraŭ ne havas Junularan Delegitan Programon, starigu ĝin. Vi povas ricevi helpon de kolegoj engaĝitaj pri junularaj defioj ĉe la Tutmonda Federacio por Unuiĝintaj Naciaj Asocioj (WFUNA). Se via Junulara Konsilaro ankoraŭ ne havas komitaton pri Celoj por Daŭripova Evoluo, ekstarigu ĝin. Ekagu. Certigu ke vi estas reprezentataj, kaj aktive kreu viajn lokojn ĉe la intertrakta tablo. Nuntempe mi provas agadi kiel ekzemplo, provante transdoni mian junularmovadan sperton de Belgio al Unuiĝinta Reĝlando, kien mi ĵus translokiĝis. Nek mi ne estas sola, nek vi estas sola.

Al ĉiuj: ni estas diplomatoj. Kiam ni agas, aŭ proponas alternativajn strategiojn, ni ne faras tion ĉi ĉar ni estas kontraŭ ĉiuj. Male, ni faras tion ĉi ĉar ni havas la samajn celojn kiel la aliaj. Ni devas montri al la mondo la Unuiĝintan Junularon, kaj inkluzivi ĉiujn, kaj montri kiel ni, tiom diversa kiel ni estas, batalas por la celoj kiel egaluloj. Al ni, ne gravas de kiu politika tendenco vi venas, aŭ de kiu regiono vi venas. Ni estas la Unuiĝinta Junularo. Aldone al nia loka komunumo, ni agnoskas la mondon kiel nian hejmon; ni protektas ĝin kaj ni batalas por ĝi. Ni, la Unuiĝinta Junularo, devas gvidi kiel ekzemploj, agadi kaj inspiri ĉiujn ĉirkaŭ ni aliĝi al ni, al niaj komunaj klopodoj.

Lasu min fini per unu el miaj plej ŝatataj citaĵoj, de indiĝena aŭstralianino kiu nomiĝas Lilla Watson, kiu bele kaptas la esencon de mia rakonto:

“Se vi venis ĉi tien por helpi min, vi malŝparas vian tempon. Sed se vi venis ĉar via liberiĝo estas ligita al la mia, ni kunlaboru.” - Lilla Watson, Indiĝena Aŭstralianino